

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №5



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №5 (295)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Povilas Jegorovas, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 68-69.

Abontarifo por 2019

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 850 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2019, №5 (295).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 25 апреля 2019 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Temo	5
UEA serĉas kandidatojn	6
Mark Fettes. Kiel redukti la deficiton?	7
Renato Corsetti. Granda ŝanco: la malnova UEA finiĝadas kaj la nova estas reinventinda	8
Eventoj	10
Przemysław Wierzbowski. Nova ZEO en Bjalistoko	11
Peter Baláž (Petro). Esperanto proponita por “Nemateria kultura heredaĵo” ankaŭ en Slovakio	13
Renato Corsetti. Pri la 12a Mezorianta Kunveno en Irano	14
Amri Wandel. Du semajnoj en Israelo kaj Jordanio	15
Tim Owen. Britio kaj Francio kunkongresis	17
Paulo Sérgio Viana. BEL-Konferencoj 2019	18
Monique Prezioso. MES, kie floras mimozoj?	19
Paulina Jaworska. Lodzo: Junulara semajnfino	20
Zbigniew Kornicki. Poznano: Ne nur UAM kaj ARKONES	21
Sergeo Abramov. Multe da popoloj, unu mondo	22
Irina Gonĉarova. Esperanto en la 8a Lerneja Lingva Festivalo en Kaluga	23
Svetlana Smetanina. La unua parola KER-sesio en Ruslando	24
Ineke Emmelkamp. Studsemajnfino vide de organizanto	25
Cyril R. Vergnaud. Tajvana literaturo en Esperanto	26
La 5a Lingva Kolokvo de KCE	27
IKU en Lahtio: rektoro kaj programo	28
Lingvo kaj kulturo: prelegoj de Ilona Koutny en BET-55	29
Profesoro Gudavičius pri la litovaj lingvo kaj kulturo	30
Anna Striganova prelegos en BET-55	31
Povilas Jegorovas. La plej amasa BET en la 21a jarcento	31
Saioa Escobar. Jam 100 aliĝintoj al la 92a SAT-kongreso	32
Tribuno	35
Pavla Dvořáková. Dek jaroj de la Esperanto-muzeo en Svitavy (2)	36
Peter Baláž (Petro). Vortoj – nova ludo, kiu movigas kaj parkerigas vortojn ...	42
Peter Baláž (Petro). Zamenhof.info – jam dujara	44
Eventa Servo fariĝis nova servo de UEA	45
Nova ago por Teo, Amo kaj Mondo	46

Arkivo	48
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en majo 2019	49
Hector Hodler. Novaj perspektivoj (IV)	50
Kulturo	53
Nikolaj Lejkin. Post la Paska diservo (Trad. Aleksander Korĵenkov)	54
Alen Kris. Iom da lumo sur portreton en ombro (Recenzo: Bo Sandelin. <i>Adam Smith. Vivo kaj verko</i>)	57
Ed Robertson. Moderna lernilo por moderna mondo (Recenzo: Tim Owen, Judith Meyer. <i>Complete Esperanto</i>)	59
<i>Literatura Foiro</i> , 2019, №298	60
<i>Unesko-Kuriero</i> pri indiĝenaj lingvoj	61
<i>Blua horizonto</i> : La unua Esperanta albumo de Kjara	62
Ricevitaj gazetoj	62
Mozaiko	63
Halina Gorecka. La kazaĥa kuirarto	64
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj	67
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	68
Reklamo	70

Ĉi tiu *Ondo* estas finredaktata la 25an de aprilo, je la Granda Ĵaŭdo, inter la Palma (en Ruslando: Salika) Dimanĉo kaj Pasko, kiam, reveninte hejmen el la preĝejo, la rusortodoksoj ordigas la hejmon por la venonta festo, bakas la Paskajn kukojn kaj kazeaĵojn, kuiras kaj ornamas la Paskajn ovojn. Sur la kovropaĝo estas la pentraĵo “Prepariĝado al Pasko” (1910) de Sergej Miloradoviĉ (1851-1943).

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Temo



La 2an de aprilo Mark Fettes informis pri la plano draste redukti la salajrojn de la oficistoj de UEA “depende de la taskaro kaj situacio de ĉiu oficisto”. La supra foto estis farita de Anna Striganova la 20an de aprilo en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, kie li, kadre de la Malferma Tago prezentis la planon sen mencii la nomojn de la oficistoj.

UEA serĉas kandidatojn



La 16an de aprilo la prezidanto de la Elekta Komisiono de UEA Michael Boris Mandirola sendis al la Komitato de UEA mesaĝon kies esencajn partojn ni publikigas ĉi-sube.

La Elekta Komisiono de UEA serĉas kandidatojn por la Estraro de UEA kaj por la postenoj de Komitatano C, Komitata revizianto kaj por la Komisiono pri Financo. La Elektado okazos dum la 104a UK en Lahtio kaj la elektitoj oficos ekde sia elekto ĝis la UK en 2022.

Estraro. La Estraro respondecas, sub gvido de la Komitato, pri la ĝenerala evoluigo de la Asocio kaj estas la ĉefa plenumorgano de la asocio. Ĝi konsistas el Prezidanto, unu aŭ du Vicprezidantoj, Ĝenerala Sekretario kaj du ĝis kvin pliaj estraranoj.

La Prezidanto reprezentas la Asocion en juraj kaj nejuraj aferoj, subskribas la ĉefajn dokumentojn kaj prezidas la Estraron kaj la Universalajn Kongresojn. Por la posteno de prezidanto, kandidatiĝis samideanoj Duncan Charters, Fernando Maia kaj Adalberto Soczówka (lia kandidatiĝo ne ricevis ankoraŭ komitatajn subtenojn).

La Vicprezidantoj laŭbezzone anstataŭas la Prezidanton. La Ĝenerala Sekretario zorgas pri la efektivigo de la decidoj de la Komitato kaj de la Estraro kaj respondecas pri la kontaktoj kun la Komitato. Krome ĉiu estrarano havas plurajn estrarajn fakojn. La estraranoj estu pretaj partopreni skajpan estrarkunsidon dufoje monate kaj vojaĝi al Roterdamo por la Estrarkunsido en la unua duono de 2020.

Komitatano C. Por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj, la komitatanoj A (reprezentantoj de landaj asocio, fakaj asocioj kaj TEJO) kaj B (reprezentantoj de la individuaj membroj) povas kompletigi la Komitaton, elektante pliajn komitatanojn ĝis la kvarono de sia propra nombro. Tiuj estas la Komitatoj C.

Komitataj revizianto. La Komitataj revizianto ekzamenas ĉiujare la librotendon kaj la administran laboron kaj raportas al la Estraro kaj al la Komitato. La minimuma nombro da revizianto estas du.

Komisiono pri financo. La Komisiono pri Financo konsistas el minimume 3 kaj maksimume 5 individuaj membroj (el kiuj unu nomumita de TEJO). Ĝi konsilas al la Komitato, la Estraro kaj la Ĝenerala Direktoro pri la buĝeto kaj aliaj financaj aferoj de la Asocio.

Kondiĉoj. Ĉiuj kandidatoj devas esti oficiale proponitaj de almenaŭ du komitatanoj de malsamaj landoj. Se oni ankoraŭ ne havas proponantan komitatanon, oni tamen ne hezitu jam kontakti la Elektan Komisionon.

Ĉiuj kandidatoj devas esti individuaj membroj de UEA.

Por esti elektita kiel estrarano de UEA aŭ kiel komitata revizianto, oni devas unue elekto kiel komitatano. Komitatano ne rajtas esti salajrata oficisto de UEA kaj devas esti individua membro de UEA jam du jarojn antaŭ la elektado.

Kontakto. Por kandidatiĝi sendu mesaĝon al elekta.komisiono@co.uea.org ĝis la 21a de majo 2019 kun motivata kandidatigo, kiun akompanas, krom la skriba konsento de la kandidato, ankaŭ biografieto kaj laŭeble foteto, klarigo pri la motivoj de kandidatiĝo, kaj konciza deklaro de la movadaj kaj poroficaj celoj (aŭ de pli konkreta agadoprogramo).

Se vi scias pri taŭga kandidato, konvinku tiun sendi sian kandidatiĝon aŭ sendu mesaĝon al elekta.komisiono@co.uea.org kaj ni mem enketos ĉe la membro.

La Elekta Komisiono: Michael Boris Mandirola, Guy Matte, Ileana Schröder, Dietrich Michael Weidmann

Kiel redukti la deficiton?



La 2an de aprilo la prezidanto de UEA Mark Fettes sendis al la komitatoj de UEA la suban mesaĝon:

Ni ĉiuj konscias pri la malfacila financa situacio de UEA, kiu de multaj jaroj iras en malbona direkto pri la malkresko de la membraro, la malaltiĝo de rentoj, kaj la ŝrumpantaj enspezoj pro kongresoj kaj librovendoj.

En Lisbono, kunlige kun la akcepto de la buĝeto por 2019 (kiu antaŭvidas deficiton de 141.262 EUR), la Komitato akceptis aldonan proponon de D. Weidmann, kiu tekstis jene:

“La buĝeta defcito en 2020 estu maksimume la duono de la buĝeta defcito 2019, kaj en 2021 maksimume 50.000 EUR, kaj ekde 2022, en periodo de 3 jaroj, estu ekvilibro”.

El tio sekvas ke la buĝeto por 2020 devas antaŭvidi deficiton ne pli altan ol 70.631 EUR.

Ĉiu, kiu iomete konas niajn financojn, komprenos, ke ni povos atingi tiun celon, nur (interalie) per reduktado de niaj elspezoj por salajroj. La buĝeto por salajroj en 2019 estas 278.000 EUR, do 66% de niaj kostoj. Krome multaj el niaj aliaj kostoj apenaŭ estas redukteblaj.

La leĝoj de Nederlando permesas, ke entrepreno aŭ asocio kun serioza defcito eniru procezon de restrukturigo de la salajroj. Mi do instrukciis al la Ĝenerala Direktoro antaŭ deko da tagoj, ke li iniciatu tiun procedon surbaze de plano ellaborita konsulte kun mi. Pasintsemajne li liveris al la koncerna ŝtata instanco (UWV) la formalan sciigon pri niaj intencoj. Hieraŭ (lunde) li informis la oficistojn, kaj aranĝis por ili kunsidon kun advokato por informiĝi pri siaj diversaj rajtoj kaj ebloj.

Laŭ la nederlanda sistemo, ĉiu koncerna oficisto havas ĝis la 10-a de aprilo por decidi, ĉu libervole subskribi portempan kontrakton kun UEA, kaj poste du pliajn semajnojn por eventuala repripensado. Tia kontrakto havus por ĉiu oficisto diversajn avantaĝojn, sed kompreneble ĉiu el ili rajtas malakcepti nian proponon. En tiu kazo

ni devus turni nin al la instanco UWV por decido. Pro tio mi ne povas ankoraŭ diri, kiaj estos la finaj rezultoj, nek komuniki al vi, kion precize ni proponis al la diversaj oficistoj. Mi diros provizore nur, ke temas pri diversaj reduktaj en labortempo, depende de la taskaro kaj situacio de ĉiu oficisto. Nia plano kompreneble baziĝas sur la sekurigo de la plej esencaj laboroj kaj servoj de la Oficejo.

Martin kaj mi evidente bedaŭras, ke tiu paŝo estas necesa. Ni tamen opinias, ke la Komitato faris saĝan decidon, kaj ni fidus, ke niaj nunaj agoj faciligos la situacion por la venonta Estraro kaj malfermos la vojon al la realigo de la restantaj partoj de la Propono Weidmann.

Mark Fettes

Granda ŝanco: la malnova UEA finiĝadas kaj la nova estas reinventenda



La historio de nia UEA de 1908 ĝis nun havis plurajn periodojn, el kiuj ni memorigu almenaŭ la svisan, la anglan kaj laste la nederlandan. Fakte de 1955 la sidejo de UEA restis en Nederlando. La movo al Roterdamo el la angla kamparo en 1955 certe fontis el saĝa decido, kaj dum la tuta periodo de Lapenna, la plej forta personeco de tiuj jaroj, ĝis la komenco de la 1970aj jaroj la asocio ĝuis periodon de kresko en trankvila lando, politike stabila kaj socie moderna. Sed jam en la 1970aj jaroj kaj pli klare ekde la komenco de la 1990aj komencis aperi signoj de ŝanĝiĝo de la mondo kaj de problemoj por idealismaj asocioj.

De 1991 la membronombro daŭre malpliĝis. Tamen pro la granda kapitalo akumuliĝinta oni ricevis renton, kiu kompensis la malmultiĝon de la membroj kaj la altiĝon de la kostoj, tiel ke oni povis pluvivi trankvile kaj liveri la samajn servojn. En la lastaj jaroj ŝanĝiĝis ankaŭ la kondiĉoj de rentoj pagitaj de bankoj, kiuj en Eŭropo praktike emas nuliĝi. Sekve la ekvilibro finfine rompiĝis kaj oni devis konstati, ke ne plu eblas pagi la salajrojn por liveri la samajn servojn. Tiu konstato oficiale aperis en ĉi tiuj monatoj, kiam la estraro provis starigi la buĝeton por la venonta jaro kaj rimarkis, ke ne eblas malpliigi la deficiton (alivorte, la uzon de la kapitalo por normalaj elspezoj) al la nivelo, kiun komitatanoj postulas. Estis multaj diskutoj pri tio dum la 103a Universala Kongreso en Lisbono pasintjare. En la fino oni decidis, ke la deficita nivelo de rondcifere 150 000 eŭroj en unu jaro ne plu estas longe eltenebla, kaj ke oni devas komenci duonigi ĝin en 2020 kaj poste entute forigi ĝin.

Antaŭ tiu dilemo la estraro decidis, ke oni devas malpliigi la kostojn por salajroj. Ĝi decidis apliki nederlandan leĝon, kiu permesas al entreprenoj en kriza situacio

renegoci la salajrojn kun la dungitoj, praktike malaltigi ilin, se la dungitoj akceptas. Se la dungitoj ne akceptas, juĝisto decidos.

Temas evidente pri tre dolora decido, kiu eventuale ne estos la sola dolora decido bezonata. Ĝi certe signifas la finon de la nederlanda periodo de UEA, ĉar tenado de tia impona oficejo en unu el la plej multekostaj urboj de la mondo ne plu estos ebla por movado, kiu altiras ĉiam malpli da membroj.

Ĉu de Roterdamo al Slovakujo survoje al Samarkando?

La estonta UEA estas reinventenda. Sed kial? Ĉu ni vere bezonas tutmondan kunordigan organizaĵon? La retaj maniuloj pensas, ke ne, ke la granda reta frato sufiĉas por ĉio. Mi kredas, ke jes, ĉar nia movado ankoraŭ ne atingis siajn celojn, kiuj estas la samaj celoj de Zamenhof: ĝeneraligi la uzon de Esperanto por faciligi kaj justigi interpopolan interkompreniĝon. Ni estas movado, kiu diras al la mondo ion, kion la mondo ne volas aŭskulti: Ne faru militojn, ne mortigu homojn, sed provu kompreni kaj esti justaj; Ne ekzistas fortuloj kaj sekvantoj; Ni ĉiuj estas egalaj. Ni devas kunordigi nian agadon tra la mondo por pliefikigi tiun agadon.

Kiel reinventi nin? Simple per komuna prudento kaj per agnosko de niaj fortoj (miloj da dediĉitaj homoj, kiuj senpage aŭ eĉ mempage laboras por niaj idealoj) kaj niaj malfortoj (neniu registaro, neniu privilegiulo, neniu riĉulo iam ajn helpos nin). Pro tio ni mem devas krei daŭripovan sistemon. Ni devas utiligi la modernajn re-tajn ilojn por minimumigi la administran laboron kaj liberigi energiojn por la esenca homkonvinka laboro. Ni devas lerni labori per tre malpeza strukturo kaj per multaj volontuloj subtene al la homoj, kiuj tra la mondo faras la bazan informan kaj instruan laboron.

Samarkando certe estas urbo pli malmultekosta ol Roterdamo, sed antaŭ ol iri tien ni devas funde reinventi nian administradon. Ĉu por tio survoja lando kiel Slovakujo povus helpi nin reinventi nin mem?

Kiu kulpas?

Nun ne estas momento serĉi kulpulojn, sed estas momento por kunlabori, ĉiu laŭ siaj kapabloj, por utiligi ĉi tiun ŝancon inventi la estontan UEA-n. Estus tre maldanke kulpigi la nunan estraron kaj la nunan ĝeneralan direktoron pro io, kio havas siajn radikojn en la pasinteco.

Cetere, ni ĉiuj kulpas. La nuna kaj la antaŭaj estraroj, kiuj vivis retorike kaj kontente kaj ne rimarkis la problemon, la nuna kaj antaŭaj komitatoj, kiuj kondutis kiel kverelemaj parlamentoj vivantaj for de la popola realo. Kaj ĉefe mi mem kulpas, ĉar kompreninte la malekvilibron en la jaro 2001a, mi ne sukcesis komprenigi al la aliaj, ke ni iras renkonte al la nuna situacio.

Sed kiel diras la titolo de ĉi tiu artikoleto, temas pri granda ŝanco krei ion, kio estos vivipova dum la tria jarmilo. Ek al la laboro!

Renato Corsetti

Eventoj



Je la 102a mortodatreveno de la aŭtoro de Esperanto en lia naskiĝurbo estis inaŭgurita monumento, kiu montras lin juna kun libro enmane. Kiun libron li portas? Ĉu lernolibron? Romanon? Poemaron? (Foto: Przemysław Wierzbowski)

Nova ZEO en Bjalistoko

La plej nova ZEO (Zamenhof-Esperanto Objekto) troviĝas nun en la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof. Temas pri monumento al juna Zamenhof.

Ekde 2014 en la buĝeto de Bjalistoko troviĝas speciala finanĉkategorio, kiu estas dediĉita al projektoj realigataj je la tuturba kaj kvartala skaloj. En la Civitana Buĝeto – ĉar tiel ĝi nomiĝas – en 2017 je dispono estis 10 milionoj da zlotoj. El inter 62 proponoj por tuturba voĉdonado estis elektitaj 29 projektoj. Voĉdonis entute pli ol 26 mil loĝantoj. En la kvartalo Centrum, danke al la voĉoj de 205 bjalistokanoj, estis decidite starigi novan monumenton al L. L. Zamenhof, malkiel kutime, prezentantan lin kiel junan knabon.

L. L. Zamenhof naskiĝis en Bjalistoko kaj loĝis en la familia domo ĉe la tiama strato Verda 6, kiu de 1919 havas la nomon Zamenhof. La domo troviĝis je kelkcentmetra distanco de la ĉefa placo, kies diverslingva homamaso donis inspiron al la estonta iniciatinto de Esperanto. Tie, laŭvoje inter la bjalistoka Babelturo kaj la familia domo, la statuo estis starigota.

Infanoj el la muzika grupo “Uku-Donaco Bjalistoko” kun sia samaĝulo Zamenhof (Foto: Stanisław Dobrowolski)



La 17an de aŭgusto 2017 la urbestro de Bjalistoko Tadeusz Truskolaski anoncis konkurson por prilaboro de projekta koncepto de la monumento sur la strato Zamenhof apud la ĉefa foirplaco (Rynek Kościuszki). La konkursaj postuloj ne estis multaj: ĝi nepre devis ne esti benko kaj nepre devis prezenti Zamenhofon kiel senbarban junulon. La 29an de novembro la konkursa ĵurio aljuĝis la unuan premion de 14 mil zlotoj al la projekto de Ryszard (skulptisto) kaj Katarzyna (arkitekto) Piotrowski el Varsovio. La aŭtoroj jene eksplikis la ideon de sia verko:

“La stratoj de Bjalistoko estis la loko de miksiĝo de la kulturoj pola, juda kaj rusa. Tia diverseco estis valoro de la urbo, sed ankaŭ ĝi kaŭzis problemojn je komunikado inter la homoj. Ĉi tiu problemo iĝis la kaŭzo de serĉado, far juna Ludoviko, de universala lingvo, en kiu ĉiu povus interkompreniĝi sen problemo, kaj neniu lingvo estus favorata. La skulptaĵo prezentas junan knabon, kiun pripenso pri sonoj de la strato haltigis dum la ĉiutaga promeno. Li koncentriĝas je literoj, kiuj estas la simbolo de la multkultura medio, en kiu li estis edukita”.

La elektita projekto, realigita poste de Ryszard Piotrowski, estas latuna statuo alta je 1,45 m, kiu prezentas la dekelkjaran Zamenhof kun libro en la maldekstra mano. Ĉirkaŭ li, inter pavimeroj, troviĝas disĵetitaj metalaj literoj de la alfabetoj latina, cirila kaj hebrea, al kiuj la persono rigardas. Antaŭ la statuo kuŝas memortabulo kun la pollingva teksto:

Ludoviko Lazaro Zamenhof

15.12.1859 – 14.04.1917

Ĉe ĉi tiu strato loĝis dum la junulaj jaroj Ludoviko Lazaro Zamenhof.

La multkultureco de Bjalistoko

inspiris lin por ellabori

la universalan lingvon Esperanto

kiu en la estonteco iĝis

populara en la tuta mondo



(Foto: P. Wierzbowski)

La statuan malkovris la urbestro Tadeusz Truskolaski dum solenaĵoj, organizitaj de Bjalistoka Esperanto-Societo la 14an de aprilo 2019 okaze de la 102a datreveno de la morto de Zamenhof, kun ĉeesto de bjalistokanoj kaj esperantistoj. La eventon prezentis lokaj kaj tutlandaj novaĵservoj. La renkontiĝon solenigis koncerto de *Uku-Donaco Bjalistoko*, kiu kantis en diversaj lingvoj *La Esperon*, la gospelan *This little light of mine* kaj la maorian *Ngā iwi e* kantojn. La bando konsistas el junuloj pli-malpli en la aĝo kaj alteco de nia juna Zamenhof.

La tuta projekto (propono, realigo kaj instalo) kostis 190 mil zlotojn. Ĝi estas unu el pli ol dudek ZEOj en la naskiĝurbo de Zamenhof kaj lia dua monumento, post la busto, kreita en 1973 de Jan Kucz, en nia urbo.

Przemysław Wierzbowski

Esperanto proponita por „Nemateria kultura heredaĵo“ ankaŭ en Slovakio

La 29an de marto 2019 SKEF (Slovakia Esperanto-Federacio) sendis oficialan proponon al la Nacia instituto (apartenanta al la Ministerio de kulturo) por enskribi Esperanton ene de la slovaka listo de la nemateria kultura heredaĵo. La titolo de la propono estas: “Jazyk esperanto – nositeľ slovenskej a esperantskej kultúry” (La lingvo esperanto – portanto de la slovaka kaj Esperanta kulturoj).

La proponon akceptis kaj subskribis krom SKEF ankaŭ ĉiuj lokaj Esperanto-kluboj/organizoj kaj Slovakia Esperanta Junularo. Nun oni detale esploras la proponon, eventuale faros pliajn demandojn, postulos pliajn dokumentojn ktp. Fine de la jaro 2019 oni devus informi pri la akcepto, eventuale malakcepto de la propono. La proponon jam anticipas subtenis kelkaj gravaj slovakaj politikistoj. Ni esperas, ke la propono estos pozitive taksita de la pritaksantoj kaj de la ministrino de kulturo, kiu havas finan, decidan voĉon.

Okaze de sukceso Slovakio iĝus la tria lando (post Pollando kaj Kroatio), kie Esperanto estus ĉi tiel agnoskita – kaj tio jam donus rekte la eblon, proponi Esperanton kiel mondan heredaĵon de Unesko! Tio jam estus vere granda atingo, nepre indas provi ĝin kaj esperi pri ties sukceso!

Ankaŭ en Litovio nun okazas preparoj por proponi Esperanton kiel kulturen heredaĵon en ĉi tiu lando.

Peter Baláž (Petro)
prezidanto de SKEF



Pri la 12a Mezorianta Kunveno en Irano

Okcidentaj ĵurnalistoj daŭre rakontas, ke ili estas liberaj, ne kiel en Ĉinujo, sed aliflanke pli ol ĉinaj ĵurnalistoj ili senkritike ripetas tion, kion la registaroj volas, ke ili diru. De kiam la prezidanto de Usono decidis pro nekonataj kaj eble nekonfesindaj motivoj, ke Irano estas lando malbona, la okcidenta gazetaro prezentas Iranon kiel landon teruran kaj pro tio kelkaj esperantistoj estis malkonsilataj vojaĝi al la tiel danĝera lando timiga. Sed ĉiuj eŭropaj partoprenintoj konsentis post la restado tie, ke irananoj estas tre afablaj, ke ĉiu helpas vin kaj ke oni ne vidas soldatojn kun armiloj aŭ policistojn traserĉantajn vin.

Cetere la esperantista agado en Irano estas rimarkinda, malgraŭ la tre malfacilaj ekonomiaj kondiĉoj pro la okcidentaj sankcioj, nomeblaj punleĝoj. La irana landa asocio de UEA ĵus aĉetis sian sidejon en la centro de la ĉefurbo, oni instruas Esperanton al universitataj studentoj en la kadro de la plej prestiĝa ĉefurba universitato Allameh Tabatabai kaj en aliaj universitatoj de la lando. Oni daŭre aperigas grandan revuon kaj tradukojn el la persa literaturo ktp.

En plaĉe mezepoka konstruaĵo en la urbo de tapiŝoj kaj kaheloj, Kaŝano, la 28-31an de marto okazis la 12a Mezorianta Kunveno, kaj sinsekvigis prelegoj pri la stato de la movado en Irano kaj en aliaj mezaziaj landoj. Mi persone estis trafita de la kvanto da agado kaj eldonaĵoj de la irana movado. Ĝi havas grupojn en ĉiuj



gravaj urboj sed ĉefe sentas respondecon pri ili kaj kunligas la membrojn per reta grupo en Telegram, la uzata programo tie. Alia specifeco de la irana movado estas ĝia seninterrompa ekzisto tra ĉiuj politikaj ŝtormoj de la pasinta jarcento. Ni ankaŭ aŭdis raportojn pri la stato de Esperanto en Uzbekistano, Taĝikujo kaj aliaj mezaziaj landoj. Estis interŝanĝitaj planoj pri komunaj agadoj en Meza Azio.

Pro la ĉeesto de Mireille Grosjean, prezidantino de ILEI, ni aŭdis pri problemoj en la fora Okcidento, ekzemple pri la rilatoj kun UN en Ĝenevo kaj pri la nova kotiz-sistemo de UEA, apenaŭ aplikebla en lando, el kiu oni ne rajtas sendi monon eksterlanden. Cetere la okcidentaj punleĝoj trafas dolorige ĉefe la normalan popolon. Pensu pri la elmigrintoj laborantaj eksterlande, kiuj ne rajtas sendi monon al siaj familioj.

Temis pri la plejgranda Mezorianta Kunveno de la lastaj jaroj, bona atingo, se oni konsideras la situacion. La plej konkretaj rezultoj de la AMO-Seminario ligita kun la aranĝo verŝajne estos plifirmigo de kontaktoj kaj agadoj en Meza Azio kaj la entuziasmigo de iranaj samideanoj, multaj el kiuj unuafoje spertis internacian kunvenon en sia lando. Temas pri io simila al la spertoj de la kongresanoj en Bulonjo-ĉe-Mar. Oni konstatas, ke Esperanto vere funkcias.

18 partoprenintoj venis el pluraj iranaj urboj kaj 18 venis el pluraj landoj: Britujo, Francujo, Svislando, Germanujo, Taĝikujo, Belgujo, Rusujo kaj Rumanujo.

Krom la prelega kaj debata programo estis ekskursoj al mezepokaj ĝardenoj kaj palacoj, al subtera urbo, al la dezerto kaj al bazaroj. Ne ĉio ĉiam funkciis glate kaj nordeŭropanoj miris pro la mediteranea aliro al la tempo kaj al la programo, sed, ĉar temis pri la unua internacia Esperanto-evento en Irano, la lokaj organizantoj por doni al ĝi respektindan aspekton sensuspektan por la instancoj maskis ĝin al turisma vojaĝo, kio donis pli da graveco al la ekskursoj ol al la prelegoj. En la fino la esenca celo: eltiri iranajn esperantistojn el ilia izoleco estis sukcese realigita kaj jam survojas planoj traduki persajn ĉefverkojn al Esperanto kaj organizi aliajn internaciajn aranĝojn en Irano. Ni sukcese defiis la punleĝojn.

Renato Corsetti

Du semajnoj en Israelo kaj Jordanio

Pli ol kvindek samideanoj el 11 landoj partoprenis la 20an Israelan Kongreson en Eilat, kiu unuafoje okazis kune kun MONA-kunveno en la apuda urbo Akaba en Jordanio. La ĉeftemo estis “Kunekzisto kaj ekologio en la Mezoriento”. Sekvis postkongresoj en Petra, la Morta Maro, Jerusalemo, Tel-Avivo kaj Haifa, kiujn partoprenis 10-20 kongresanoj, ĉefe el eksterlando. La programo estis senprecedence riĉa kaj kune kun la postkongresaj ekskursoj daŭris du semajnojn.

Jam antaŭ du jaroj komenciĝis la preparado kaj la reklamo por la 20a Israela Kongreso. Unue la intenco estis ke la komuna aranĝo inkludu la Mezoriantan Kongreson, kiu fine okazis en Irano. Anstataŭe la kuna aranĝo nomiĝis kunveno



de MONA (komisiono de UEA pri Meza Oriento kaj Norda Afriko). Dum pli ol unu jaro MONA kune kun ELI (Esperanto-Ligo en Israelo) provis informi en Jordanio pri Esperanto kaj varbi jordaniajn partoprenantojn, kiuj fine ne estis trovitaj.

Muzike akompanis la kongreson *Kajto* kaj JoMo, kiuj kune havis kvar koncertojn. Krome okazis eŭritmia dancado de Tali kaj Franz kaj kantado de Entica. La ekskursiva programo dum- kaj post-kongresa estis eksterordinare riĉa. En Eilat oni vizitis la dezertan parkon Timna, grimpis al la monto Cfaĥot kaj esploris la subakvan muzeon. Post la MONA-kunveno en Akaba 20 kongresanoj ekskursis al Wadi Rum kaj Petra en suda Jordanio. Sekve 15 kongresanoj vizitis la Mortan Maron, Masada, Ein Gedi, Jerikon, Jerusalemon kaj Tel-Avivon. Fine deko da kongresanoj vizitis la nordan regionon de Israelo: Haifa, la Bahaa Centro, Nazareto, Lago de Galileo kaj Akko. Ĉiuj ekskursoj estis profesie ĉiĉeronitaj en Esperanto (ĉefe de Amri) kaj akompanitaj de aktiva varbado por Esperanto.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno



Leginte la duan parton de la artikolo de Pavla Dvořáková pri la Esperanto-Muzeo en Svitavy, pripensu, ĉu kaj kiel vi povas spekti kaj uzi ĝiajn kolektojn kaj helpi ĝin. Ĉu per vizito? donaco? diskonigo? aŭ almenaŭ per retvizito?..

Dek jaroj de la Esperanto-muzeo en Svitavy

2a parto. Eta bilanco kaj resumo de la revoj kaj realeco

En la novembra numero de *La Ondo de Esperanto* mi priskribis la estiĝon de la Esperanto-muzeo en Svitavy, la bazajn principojn de ĝia funkciado kaj ĝiajn specifajn trajtojn, per kiuj ĝi diferenciĝas de la ceteraj Esperanto-muzeoj. Tiam mi promesis daŭrigi “en unu el la sekvontaj numeroj”, sed mi ne supozis, ke pro pluraj kialoj tio daŭros duonan jaron. Mi pardonpetas pro la prokrasto.

Ne estas facile kapti la esencon de la dekjara laborado en unu artikolo, ĉar ne devas temi pri longa teda oficista agadraporto aŭ pri supraĵa odo je niaj brilaj sukcesoj. Tamen la dekjara jubileo meritas ioman resumon kaj internacian diskonigon de la projekto. Krom sukcesoj mi volus mencii ankaŭ de ekstere nevideblajn problemojn kaj komplikaĵojn, kiujn ni devis kaj devas solvadi, ĉar vere ne temas pri promeno tra la rozĝadeno. Temas pri mia persona starpunkto laŭ mia propra laborsperto kaj kompreneble mi ne pretendas ian kompletecon.

La nomo “Esperanto-Muzeo”, des pli en tiom ĉarma konstruaĵo, sendube sonas bele kaj digne kaj por ni temis pri loga defio. Tamen unu el la principaj demandoj por ni estis kaj daŭre estas: kiugrade – malgraŭ pluraj evidentaj avantaĝoj por nia movado – la plejparte statika muzea formo taŭgas por efika publika prezento de Esperanto? Tio, kio ĉefas, la viva komunikado kaj rilatoj, nur malfacile pereblas.

Por mi mem tio estis daŭra fonto de streso. Belaj kolektmaterialoj aŭ eldonaĵoj ne tiom abundas, aŭ la originaloj ne plu haveblas aŭ tro multekostas, necesas plejparte pene serĉi kaj krei faksimilojn el interreto, kaj la pretigon daŭre komplikas la ekstremecaj kopirajtaj reguloj. Mankas rimedoj kaj parte ankaŭ teknika kompetenteco por utiligo de atentokaptaj interagaj teknologioj – nia originala multimedia tuŝpanelo intertempe jam maljuniĝis kaj nun ne plene funkcikapblas. La devo skribi dulingve (ankaŭ por la publiko) malgrandigas la spacon por la bildoj kaj unuavide mallogas iujn de legado. Pro la loĝdistanco de Svitavy malfacilis optimume plani fizikan instaladon k. t. p.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Zamenhof.info – jam dujara

La 14an de aprilo 2019 pasis 102 jaroj post la morto de L. L. Zamenhof. Antaŭ du jaroj, omaĝe al la 100-jariĝo de lia morto ekfunkciis la retejo www.zamenhof.info

Kio? Kiel skribiĝas en la endkonduko de la retejo mem:

«Tiu ĉi retejo estas dediĉita al L. L. Zamenhof, kiu estas ĉefe konata kiel “aŭtoro de la internacia lingvo Esperanto”, eĉ se li mem nomis sin nur “iniciatinto” de tiu ĉi lingvo.

« Zamenhofon eblas titoli “kaŝita geniulo” de la 19-a kaj 20-a jarcentoj. Geniulo, kiu sukcesis tre lerte doni vivon al la plej facile lernebla lingvo, kiu bonege funkcias por internacia (aŭ eĉ transnacia) komunikado.

« La retejo do estas iasenca omaĝo al li ĉi-okaze. Kaj, kompreneble, la ĉefa celo estas prezenti lin, lian laboron, verkaron kaj filozofion al vi, kiuj (eble) ne konas lin tiom bone. Ĉar li kaj lia laboro meritas esti konata multe pli vaste, ol ĝi nun estas. Ĉar L. L. Zamenhof ne nur estis iniciatinto de Esperanto, sed ankaŭ pacisto, kuracisto, tradukanto, verkisto kaj filozofo, kreinta interesan spiritan skolon sub la nomo “Homaranismo”. Ĝuu do malkovradon de tiu ĉi kaŝita geniulo, ĉi tiu retejo celas malkaŝi lin».

Kiel? La retejo estis projekto de tri volontuloj de E@I (Ilja, Laŝa, Edoardo), kiuj povis ĝin realigi ankaŭ danke al EVS (Eŭropa Volontula Servo). Tiel la projekto estis plene pagita de la EU-fonduso. Certe indas pli ekspluati tiun ĉi terenon, danke al kiu oni povas pere de la “publika mono” agadi por kaj per Esperanto.

Kial? Zamenhof.info havas longan historion. E@I aĉetis jam en 2007 ĉi tiun domajnonomon, konsciante, ke ĉiuj ceteraj finaĵoj (.com, .net, ...) estis jam okupitaj kaj uzitaj por tute nerilataj, komercaj aferoj, ne por la iniciatinto de Esperanto. Sed tiam E@I ne havis homfortojn por realigi la enhavan parton por la paĝaro. Tial ni plurfoje proponis al UEA kunlaboron kun la celo krei fine belan, reprezentan paĝaron omaĝe al Zamenhof. Evidentiĝis, ke diversaj estraranoj de UEA en diversaj etapoj dum la lastaj dek jaroj havis aliajn prioritatojn, aliajn gravaĵojn por fari. La kunlaboro ne sukcesis. En vintro 2016 E@I sendis plian/lastan proponon al UEA kunrealigi la retejon. Ĝi denove estis rifuzita, kaj anstataŭ kunlaboro UEA decidis mendi por si alian retejon (eble malpli koste?) – tiel ekestis <http://zamenhof.life>. Do oni ne nur ne kunlaboris kun E@I, sed eĉ efektive alproprigis al si nian projekton kaj ties ideon kaj lasis ĝin realigi al aliulo... Foje eĉ ene de nia komunumo oni devas atente pripensi, al kiu kion proponi.

Tamen plej grave estas, ke la paĝaro funkcias, ja Zamenhof meritas havi eĉ du retejojn.



Aprilo 2017 estis speciale grava tempo, por kiu ni volis la retejon realigi – kaj danke al la laboremo de niaj tri volontuloj kaj subteno de EVS pere de la programo Erasmus+ tio sukcesis.

Kies? La retejo celas ĉefe informi pri la vivo kaj filozofio de Zamenhof ĉiun, kiu scivolemas – por tio utilas havi la paĝaron en laŭeble multaj lingvoj. La enhavo ja estas ĉies, kiu emas ĝin konsumi = legi. La retejo aperas nun en 15 lingvaj versioj (el ili du – la kataluna kaj bulgara estas ankoraŭ ne fintradukitaj). La tradukado estas facile farebla kaj funkcias tre uzantamike – oni nur registriĝas en la “Tradukejo” de E@I kaj povas eklabori (la ligilon vi trovos en la butono por ŝanĝi/elekti la lingvon en la retejo). La tuta laboro okazas rete, sen bezono de teknika prilaboro – tuj kiam oni tradukas la enhavon al sia lingvo, ĝi aŭtomate konserviĝas kaj videbliĝas en la retejo. Se via lingvo mankas en la retejo, aŭ ĝi ne estas kompleta, kontaktu nin ĉe info@ikso.net, kaj ni volonte helpos. Ne faru tion por ni, eble nek por vi – faru tion por Zamenhof kaj por ĉiuj aliaj, kiuj povas havi utilon de via laboro kaj ankaŭ danke al via kontribuo ekscii pri lia genio, ĉar li vere meritas tion!

Peter Baláž (Petro)
E@I-kunordiganto

Eventa Servo fariĝis nova servo de UEA

La retejo Eventa Servo <https://eventaservo.org> fariĝis nova servo de UEA. Eventa Servo (ES) estas kreita de la brazilano Fernando Ŝajani kun moderna plurrimeda sistemo por listigi Esperanto-eventojn tutmonde. La celo de ES estas ebligi al esperantistoj scii, kio okazas en Esperantio, kaj samtempe diskonigi siajn proprajn eventojn – memstare, sen interveno de ajna sistema prizorganto. La akiro por UEA estis frukto de interkonsentoj inter Fernando Ŝajani, mem donacanto de la servo, kaj la estrarano Fernando Maia Jr., kadre de lia agado pri Kongresoj.

Per sia sperto pri programado Fernando Ŝajani tute originale kreis la sistemon. Grupo de programistoj gvidita de Ŝajani mem estis oficiale komisiita por prizorgi kaj evoluigi la sistemon. Ĉiuj rajtas uzi la servon senpage. Laŭ sia nuna stato ES postulas pagon de domajna nomo (12 USD jare) kaj servilo (po 5 EUR monate). Danke al amikaj donacantoj, jam estas rimedoj por teni la servon ĝis oktobro 2020, tute senkoste al UEA. Dum tiu periodo la komisiita grupo esploros opciojn por plene daŭripovigi la servon. Se ankaŭ vi emas donaci por ES, kontaktu la estraron Fernando Maia Jr. per la retadreso fmaiajr@gmail.com.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Novaj perspektivoj

IV.

La celo de nia propagando estas la formado de veraj Esperantistoj, t. e. de personoj bone sciantaj nian lingvon kaj ĝin uzantaj. Por atingi tiun celon ni skribas artikolojn, faras paroladojn, arangas kursojn, sed la faktoj devigas nin konstati, ke el la multaj personoj, kiuj eklernas Esperanton, nur malmultaj fariĝas „veraj Esperantistoj“. El Esperanta kurso, kiun komence vizitas ekzemple trideko da lernantoj, ofte nur la duono persistas ĝis la fino, kaj el tiu duono tri aŭ kvar daŭrigas poste interesiĝi al nia movado. Lernis nian lingvon verŝajne unu miliono da homoj, sed UEA, celanta kunigi la Esperantistojn, kiuj havas internaciajn interesojn, kalkulas nur kelkajn milojn da membroj. Do, granda diferenco inter la peno kaj la rezulto.

Tiu stato havas kaŭzojn. La unua kompreneble estas, ke la pli multaj homoj estas ne persistemaj. La mondo estas plena de dilantantoj, kiuj entuziasme eklernas ian lingvon, sciencan aŭ sporton, sed post kelka tempo malentuziasme forlasis la komencitan laboron. Kontraŭ tiu malbono, de kiu suferas ankaŭ aliaj progresemaj movadoj, ni estas ja senpovaj. La Esperantistoj havas nek la celon, nek la povon ŝanĝi la homan naturon. Sed tiu ĝenerala kaŭzo ne sufiĉas por klarigi la supre aluditan mankon. Alia grava kaŭzo kuŝas en tio, ke lerninte nian lingvon multaj ne uzas ĝin, ne scias kiel ĝin uzi kaj sekve forgesas ĝin rapide.

la lernintoj kotizajon por la grupo kaj arangi feston por soleni ilian Esperantistigon tute ne sufiĉas; oni devas, jam dum la kurso, doni okupon, celon al ĉiu lerninto, sentigi al li, ke Esperanto estas nur ilo, kiun li uzu por siaj intereso. Ĝuste tial estas multe pli bone arangi kurson por samprofesianoj kaj sampartianoj, al kiuj oni povas de la komenco montri komunan praktikan celon, kiu ilin ĉiujn interesas, ol ĝeneralan kurson, kie partoprenas ĉiuprofesiaj kaj ĉiukondiĉaj personoj sen io ajn komuna inter ili krom la deziro lerni Esperanton. Ankaŭ pro la sama kaŭzo malgrandaj kursoj, kie la instruanto povas okupiĝi pri ĉiu unuopa lernanto, estas pli bonaj ol grandaj kursoj, kie la individueco de la lernantoj malaperas. Ni neniam oferu la kvaliton al la kvanto.

Tiel same ni ankaŭ ne devas kredi, ke ĉiu ajn homo nuntempe povas fariĝi vera Esperantisto. Oni ofte vidas en Esperantaj kursoj kaj grupoj personojn, kiuj ne bezonas nian lingvon, ĉar ili ne havas ian internacian intereson. Ili mem ne ŝcias, kial ili ĝin eklernis. Nur al la festoj kaj dancoj organizitaj de la grupo ili interesiĝas. Tiaj dancemaj „Esperantistoj“ ofte teldelas el la grupoj la pli seriozajn individuojn, kiuj vidas en nia afero ion pli altan ol pretekston por amuziĝoj. Inverse, ekzistas multaj personoj, kiuj jam nun havas internaciajn interesojn, sed ne lernas Esperanton, kvankam ĝi al ili povus esti utila. Ekzemple, ĉe la lasta internacia socialista konferenco en Bern, kies ĉiuj partoprenantoj ofte rilatis kun eksterlandaj sampartianoj kaj kies idealo estis internaciema, neniu sciis Esperanton kaj eĉ la pli multaj apenaŭ konseis pri la graveco de la problemoj; tamen la maloportunaĵoj de la lingva diverseco estis evidentaj kaj konfesataj de ĉiu.

«Tio, kion ni emfaze nomas la “triumfo de nia afero” ne estas io estonta kaj malproksima; tiu triumfo konsistas el la aro da ĉiutagaj konkretaj sukcesetoj nun realigeblaj. Esperanto “triumfas” ĉiufoje kiam ĝi servas al iu», – skribis antaŭ cent jaroj, en majo 1919 Hector Hodler en la kvara parto de sia artikolo *Novaj perspektivoj* aperinta en la kvina numero de la revuo *Esperanto*, kiun Hodler redaktis. Vidu p. 50-52.

Jubileoj kaj memordatoj en majo 2019

2. Antaŭ 85 jaroj naskiĝis **Gersi Alfredo Bays** (1934-1947-), brazila instruisto, eldonisto k e-isto, fondinto de la revuo *Fonto* (1980-2006) k de la eldonejo *Fonto*, aŭtoro de la romano *La Profeto el Pedras* (2000), membro de AdE (2000-09); honora membro de UEA (2014), laŭreato de la premio de la fondaĵo Grabowski (1990) k de la E-Kulturpremio de Aalen k FAME (1996). – Legu pli en NDK, p. 29-30.

6. Antaŭ 180 jaroj naskiĝis **Émile Javal** (1839-1903-1907), franca judo, eminenta oftalmologo, politikisto k e-isto, reformemulo de Eo, la plej proksima E-amiko de L. Zamenhof, akirinto de la Ordeno de Honora Legio por Zamenhof (1905), la sola e-isto kiu serioze studis la homaranismon de Zamenhof; dekomenca membro de LK (1905-07); kunfondinto k kunfinancinto (kun H. Sebert) de E-ista Centra Oficejo en Parizo (1905). – Legu pli en NDK, p. 142-144.

6. Antaŭ 55 jaroj mortis **Hideo Yagi** (1899-1917-1964), japana ginekologo k e-isto, ĉefdelegito (1953-62), komitatano (1956-64), estrarano (1959-64) k la unua azia prezidanto (1962-64) de UEA, prezidanto de LKK de la 50a UK (Tokio, 1965), kies okazigon li ne ĝisvivis. – Legu pli en NDK, p. 301-302.

7. Antaŭ 95 jaroj naskiĝis **Marjorie Boulton** (1924-1949-2017), angla instruistino k e-istino, prezidanto de Rondo Kato / E-ista Kat-Amikaro (1986-2017), aŭtorino de libroj beletraj (*Kontralte*, 1955; *Cent ĝojkantoj*, 1957; *Eroj kaj aliaj poemoj*, 1959; *Dekdu piedetoj*, 1964; *Okuloj*, 1967; *Rimleteroj*, kun W. Auld, 1976 k. a.) k nefikciaj (*Zamenhof. Creator of Esperanto*, 1960; *Poeto fajrokora*, 1983; *Faktoj kaj fantazioj*, 1984 k. a.); membro de AdE dum 50 jaroj (1967-2017), honora membro de UEA (1985), laŭreato de la E-Kulturpremio de Aalen k FAME (1998), de la premio Degučič (2004) k de la premio de la Fondaĵo Grabowski (2014). – Legu pli en NDK, p. 43-44.

19. Antaŭ 25 jaroj mortis **Emilija Lapenna** (fraŭline: Heiligstin, 1910-1931-1994), ŝtatoficistino (financo k statistiko) k e-istino, la unua edzino de Ivo Lapenna (1934), sekretario de JEF (1953-55), vicprezidanto de KEL (1955-57), ĉefdelegito (1953-87) k komitatano (1957-74) de UEA, kunlaboranto de la E-redakcio de Radio Zagreb (1956-92), sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA (1965-74), aŭtoro k tradukinto de pluraj verkoj, honora membro de UEA (1979).

23. Antaŭ 120 jaroj naskiĝis **Milda Jakubcová** (fraŭline: Pirksts, 1899-1924-1979), latva oficistino k e-istino, post la edziniĝo kun František Jakubec (1932) loĝinta en Ĉeĥoslovakio, E-instruistino k poetino (*Elektitaj versaĵoj*, 1969; *Estrado de animaloj*, 1970), tradukinta al Eo beletraĵojn el la latva, rusa, ĉeĥa k slovaka lingvoj.

27. Antaŭ 145 jaroj naskiĝis **Hjalmar Johannes "Nino" Runeberg** (1874-1901-1934), svedlingva finnlanda instruisto, literaturisto k e-isto, iniciatinto (1907) k la unua prezidanto de EAF, tradukinto de *Jolanta, la filino de l' reĝo René* (H. Hertz, 1908), *Tri legendoj*, 1909), *Sonĝo de Scipio* (Cicerono, 1910); dekomenca membro de LK (1905-20).

Aleksander Korĵenkov

Novaj perspektivoj

IV.

La celo de nia propagando estas la formado de veraj Esperantistoj, t. e. de personoj bone sciantaj nian lingvon kaj ĝin uzantaj. Por atingi tiun celon, ni skribas artikolojn, faras paroladojn, aranĝas kursojn, sed la faktoj devigas nin konstati, ke el la multaj personoj, kiuj eklernas Esperanton, nur malmultaj fariĝas “veraj Esperantistoj”. El Esperanta kurso, kiun komence vizitas ekzemple trideko da lernantoj, ofte nur la duono persistas ĝis la fino, kaj el tiu duono tri aŭ kvar daŭrigas poste interesiĝi al nia movado. Lernis nian lingvon verŝajne unu miliono da homoj, sed UEA, celanta kunigi la Esperantistojn, kiuj havas internaciajn interesojn, kalkulas nur kelkajn milojn da membroj. Do, granda diferenco inter la peno kaj la rezulto.

Tiu stato havas kaŭzojn. La unua kompreneble estas, ke la plej multaj homoj estas ne persistemaj. La mondo estas plena de diletantoj, kiuj entuziasme eklernas ian lingvon, sciencon aŭ sporton, sed post kelka tempo malentuziasme forlasas la komencitan laboron. Kontraŭ tiu malbono, de kiu suferas ankaŭ aliaj progresemaj movadoj, ni estas ja senpovaj. La Esperantistoj havas nek la celon, nek la povon ŝanĝi la homan naturon. Sed tiu ĝenerala kaŭzo ne sufiĉas por klarigi la supre aluditan mankon. Alia grava kaŭzo kuŝas en tio, ke lerninte nian lingvon multaj ne uzas ĝin, ne scias kiel ĝin uzi kaj sekve forgesas ĝin rapide.

Ekzistas Esperantistoj, kiuj opinias, ke Esperanto estos venkinta, kiam per registara dekreto ĝi estos devige instruata en la ĉiulandaj lernejoj. Ili konsideras la tutan problemon nur el tiu vidpunkto. Nu, tio tute ne sufiĉas. Se samtempe kun la instruado en la lernejoj, oni ne aranĝas praktikajn servojn, per kiuj la lernintoj povos tuj utiligi la ĵus akiritan scion, oni atingos tre mizeran rezulton. En ĉiuj gimnazioj de la mondo oni nuntempe instruas la latinan lingvon.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



La 19an de aprilo 2019, vendrede, aperis surdiske kaj elektronike la debuta Esperanta albumo “Blua horizonto” de la itala kantistino, tekstoautorino kaj muzikistino Kjara (Chiara Raggi). Legu pli en la 62a paĝo.

Post la Paska diservo

de Nikolaj Lejkin



La riĉa metiisto Pankrato Davidoviĉ Uĥovjortov kun siaj familianoj ĵus revenis hejmen post la festa Paska diservo.

– Kristo resurektis! – li kriis al la kuiristino, kiu malfermis la pordon, kaj komencis la Paskan kisgratuladon, turnante al ŝi siajn vangojn, kaj tuj aldonis: – Kial vi, stultulino, ŝmacas lippe? En la himnoj estas kantate “ni brakumu unu la alian”, sed pri kisado nenio estas dirita.

– Mi pro la sento, sinjoro... Jen ovo por vi, – balbutis la kuiristino.

– Dankon. Pelagea Dmitrijevna, donacu al ŝi responde du ovojn de la dua klaso, – li diris al la edzino.

La lernoknaboj, senditaj al la preĝejo por konsekri la Paskajn kukojn kaj kazeaĵon, dume ne revenis, kaj pro tio oni ankoraŭ ne povis sidiĝi ĉe la tablon por malfastiĝo. Tio iom kolerigis la mastron.

– Jen idolanoj! Verŝajne ili haltis ie survoje kaj saltludas, – li supozis. – Estas grandioza tago, sed alitempe oni devus treni ilin je la haroj.

– Ne faru tion je la festo, – la edzino haltigis lin. – Prefere pro tio mi donu al ili frakasitajn ovojn, sed ne la sendifektajn.

La infanoj de la gemastroj paŝis ĉirkaŭ la tablo kun festmanĝoj, tuŝis per siaj fingroj porkfemuran ŝinkon kaj lekis la fingrojn.

– Ne tuŝu la ŝinkon! – kriis al ili la patrino. – Tiuj, kiuj antaŭ la sanktigita Paska kuko malfastiĝas per alia manĝaĵo, dum la tuta jaro malsanos.

– Ĉu vi rimarkis, kiel Tiĥonov gratulis min post la diservo? – la mastro demandis ŝin.

– Kaj kiel?

– En tre aroganta maniero kaj kun fieraĉa rideto sur la vizaĝo, kvazaŭ dirante: kraĉ’ al vi, nun mi mem mastrumas kaj tute ne emas estimi vin. Sed ankoraŭ antaŭ jarduono li laboris en mia metiejo. Aĥ, kiel rapide oni forgesas la bonon. Eĉ pli! Li stariĝis apud mi kaj diris: “Se temas pri densa orumado, mi per miaj laboraĵoj en plej bona maniero povas kankanenci kun vi”. Imagu: li, kaj kun mi!

– Paĉjo, ne kankanenci, sed konkurenci, – atentigis la patron la pli aĝa filo, gimnaziano.

– Tute ne gravas. Sed vidu: kia impertinento!

- Paĉjo, la laboristoj venis por Krista gratulado kaj alportis ege grandan ovon,
- raportis la juna filo, alkurinta el la kuirejo.
- Jen kiel! La laboristoj jam revenis el la preĝejo, sed la knaboj ankoraŭ vag-aĉas! – laŭtis la mastro.
- Ĉu ni gratulu la laboristojn per duaklasaj ovoĵ? – demandis la edzino.
- Certe, per la duaklasaj. Ne necesas dorloti ilin. Kion ili komprenas? Ili bezonas nur iun ovon.
- Mi ne interkisiĝos kun la laboristoj. Kial mi vane trivu miajn lipojn? Mi foriros, – diris la aĝa filino.
- Restu, Maria! En tiaj tagoj oni devas forĵeti la orgojlon. Finfine, kial temas pri la lipoj? Vi povas kunpremi la lipojn kaj turni al la laboristoj nur viajn vangojn. Ja ili verŝajne ne truigos la vangojn per siaj kisoj.
- La laboristoj, vestitaj per novaj manteloj kaj jakoj, eniris kaj donacis al la mastro gigantan tornitan ovon. Iliaj haroj estis grase oleitaj, kaj pro tio en la ĉambro sentiĝis la olivoleaodoro.
- Kristo resurektis! Vere resurektis! – eksonis la ĝojkrioj, kaj komenciĝis interkisiĝa ŝmacado, kiu daŭris kelkajn minutojn.
- La laboristoj iris laŭvice, de la pli aĝa al pli juna familiano, komencinte de la mastro. Ĉiu familiano, metinte sian manon en la korbon, elkorbigis unu ovon kaj donacis al ĉiu laboristo.
- Ĉu vi vidis la knabojn kun la Paskaj kukoj? – demandis la mastro.
- Ne, ni ne vidis. Ĉu ĉi tiuj friponoj ĝis nun ne venis? Pankrato Davidoviĉ, vi estas tro bonkora kaj milda. Prefere ni traktu ilin laŭ nia maniero!
- En la ĉambron enkuris la anhelantaj knaboj kun saketoj, en kiuj estis la Paskaj kukoj kaj kazeaĵo. Laboristo sukcesis pinĉi orelon de unu el ili.
- Kie vi ludaĉis ĝis la nuna tempo? Ĉu ne sufiĉos la morgaŭo por viaj bestaj amuziĝoj? – kriis la mastro.
- Ni staradis ekstere. La pastroj longe ne eliris por la konsekrado, – provis senkulpigi la knabojn.
- Ĉu vi metis la dudekkopekan moneron, kiun mi donis al vi, sur la pleton de la akolito?

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Iom da lumo sur portreton en ombro

Sandelin, Bo. *Adam Smith. Vivo kaj verko.* – Novjorko: Mondial, 2018. – 86 p.

La libro de Bo Sandelin pri Adam Smith falis en miajn manojn, dum mi legis samtempe Friedrich Hayek kaj Thomas Piketty, verkistojn kiuj signas la liberalan kaj socialan kontraŭpunktojn en la ekonomika penso. Smith staras origine de la firma vojo de la scienco, aparte de l' merkantilistoj, sed ne tre proksime al iliaj oponentoj-fiziokratoj. Kiel tio ofte okazas kun la klasikuloj, li situas iom en ombro aperinta de l' aŭreolo de lia aŭtoritato. Kuintime li estas konsiderata liberala, pledanta por la principo "laissez faire".

Oni vidas en Smith apostolon de la "nevidebla mano" de l' merkato ne lasanta al la ŝtato iun alian rolon ol tiun de nokta gardisto. La saman reputacion havas hodiaŭ Hayek, kaj (kiel mi certiĝis legante lian *Vojon al sklaveco*) tiu reputacio ne estas tute justa. Certe, oni povas diri, ke Hayek ne prenas en sian konsideron la dimension, kiu estas baza por Piketty, t. e. li ignoras la aspekton de l' ekonomia libereco de proleto kaj sin koncentras sur la minacoj de la ŝtata reglamentado. Sed simpligo estus nomi Hayek-on heroldo de la ŝtata foresto... Bo Sandelin demonstras al oni analogan precedencon kun Adam Smith.


Se temas pri utileco de Esperanto kaj iutempe pri utileco de l' plonĝoj en profundojn de la historia forgeso, mi havas jen ekzemplon. Oni eldonas en Novjorko en sufiĉe ekzotika lingvo libron de nekonata svedo pri nun nelegata panteona skoto... kia stranga fantazio, kaj tamen.

Tamen mi dankas la fortunon, la eldoniston, la redaktoron de *La Ondo* kiu donacis al mi la libron, kaj, certe, mi dankas Bo Sandelin-on kiu ĵetas iom da lumo sur la portreton de Adam Smith.

Mia persona opinio tenas Smith-on distance de l' asociataj kun li Ricardo kaj Marx. La du lastaj sin pozicias "objektive" kaj "science", pretendante labori kun la faktoj de la ekonomio kiel tion faras fizikisto aŭ astronomo, dum la unua ne forlasas la grundon de la morala aprezo.

Alivorte, diference de la du klasikuloj, Smith analizas la ekonomian realon ankaŭ en la nocioj de Bono-Malbono. En tiu aspekto oni povas konstati konsiderindan superecon de la skota filizofo, portanto de la tradicio de l' enciklopedia universalismo, – liaj postuloj, atencotaj de l' specialigado de l' 19a jarcento, estis perdontaj la homan valoron en sfero de l' homaj rilatoj – fatala perdo, elimino de grava faktoro de l' produktada procezo ne reduktebla al pura mekaniko.

Mi rekomendus la libreton de Sandelin kiel gvidtekston por eniro en la bazan idearon de la klasika ekonomika teorio. La aŭtoro koncize rakontas pri la praktika



kaj intelekta vivo de sia heroo kaj korektas gravajn erarojn de la historia memoro. La aŭtenta Adam Smith, certe, ne estis ribelanto, sed egale li ne estis fervora partizano de la ekzistanta ekonomia sistemo. Kiel rimarkigas Sandelin, li pli aprezis la kapitalismon ol la kapitalistojn. Oni emas reprodukti la analizon de Smits pri la bonefika divido de la laboro. Sed tiu analizo estas ĉe Smith multe pli profunda. Pardonu pro longa citaĵo:

Dum la evoluo de la divido de la laboro, la taskoj de la pli granda parto de tiuj, kiuj vivas de sia laboro, t. e. la plimulto de la popolo, reduktiĝas al kelkaj tre simplaj manovroj, ofte unu aŭ du. Sed la komprenado de la plimulto de la homoj necese estas formita de ilia ordinara okupo. Tiu, kiu pasigas la tutan vivon farante nur kelkajn simplajn manovrojn, kies efiko ankaŭ eble estas ĉiam la sama, aŭ preskaŭ la sama, ne havas okazon uzi sian komprenadon aŭ ekzerci sian kapablon trovi rimedojn por forigi malfacilaĵojn, kiuj neniam okazas. Tial li kompreneble perdas la kutimon de tia penado, kaj ĝenerale fariĝas tiel stulta kaj senscia kiel eblas por homa estaĵo. La letargio de lia menso igas lin ne nur nekapabla ĝui aŭ partopreni prudentan konversacion, sed nekapabla havi iun ajn grandaniman, noblan aŭ teneran senton, kaj sekve nekapabla akiri ĝustan prijuĝon eĉ koncerne multajn ordinarajn devojn de la privata vivo. Pri la grandaj kaj vastaj interesoj de lia lando, li estas tute nekapabla fari prijuĝon, kaj se ne tre specifaj klopodoj estas faritaj por igi lin alikarakterata, li estas same nekapabla defendi sian landon en milito. La unuformeco de lia stagninta vivo kompreneble korpuras lian kuraĝon, kaj igas lin rigardi kun abomeno la neregulan, necertan kaj aventuran vivon de soldato. Ĝi ruinigas eĉ la viglecon de lia korpo, kaj faras lin nekapabla uzi sian forton kun vigleco kaj persisto en iu ajn alia okupo ol tiu, pri kiu li al kutimiĝis. Lia lerteco pri lia propra specifa okupo ŝajnas, tiele, esti akirita je la kosto de liaj intelektaj, sociaj kaj militaj virtoj. Sed en ĉiu evoluinta kaj civilizita lando, tio estas la stato, en kiun la laborantaj povrujoj, t. e. la granda amaso de la popolo, devas necese fali, se la registaro ne klopodas malhelpi ĝin. (p. 62-63)

Ĉu vi ne aŭdas tie ĉi voĉon de protesto, voĉon sonontan kaj resonontan en la proksima futuro en ĉiuj anguloj de la industria mondo?

Fine mi diru kurte pri la lingvaĵo de Sandelin: ĝi igis min kompreni sen deklini la penson de la celo. Mia opinio, tio estas la plej laŭdinda merito en la tekstoj de simila tipo.

Alen Kris

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



Post plurmonata paŭzo en majo reaperas la kuirarta rubriko, en kiu Halina, naskiĝinta en Kazaĥstano (pri tio vi povis legi en la aprila *Ondo*, kie ŝi artikolis pri la novaĵoj sur la Kazaĥstana mapo), rakontas pri la kazaĥa nacia kuirarto, precipe pri beŝbarmako, kiun ŝi nepre kuiras por nia redakcia “dastarĥano”.

La kazaĥa kuirarto

Kiel vi renkontas, mi ekkonos laŭ via rigardo,
kiel vi estimas, mi ekkonos laŭ via taso.

(Kazaĥa popoldiro)

Specifaĵoj de la kazaĥa kuirarto

La kazaĥa nacia kuirarto respegulas la historion, kulturon kaj tradiciojn de la popolo. Ĝi formiĝis en la kondiĉoj de nomada vivmaniero. Origine la kazaĥoj ne havis tiom multajn receptojn, kiom estas nun: pro oftaj translokiĝoj oni ne uzis fornojn kaj preparis manĝojn sur aperta fajro, kuirante viandon en kaldrono, pretigante acidlaktajn trinkaĵojn en saketoj.

Same kiel ĉe aliaj nomadoj, la nacia kuirarto de kazaĥoj konsistas ĉefe el satigaj viandaj manĝoj, farunaj dolĉaĵoj kaj acidlaktaĵoj, kiujn oni uzas kiel ingrediencojn de diversaj pladoj kaj memstare.

La formiĝo de la moderna kazaĥa kuirarto komenciĝis fine de la 19a jarcento, kiam la popolo estis transiranta al nenomada vivstilo. Pro la vivmaniero de la antaŭaj generacioj de kazaĥoj, kiuj vivis per bredado de brutoj, la naciaj pladoj en Kazaĥstano konsistas, ĉefe, el viando, grio kaj laktaĵoj.

Ĉevalaĵo estas la nacia viandospeco ĉe la kazaĥoj, kvankam nun ĝi estas uzata malpli ofte ol ŝafaĵo kaj eĉ bovaĵo. Sed ĝuste el ĉevalviando estas preparataj tiaj tipaj kazaĥaj produktaĵoj kiel *kazy*, *kartá*, *ŝuĵuk* k.a.

La nomoj de la plimulto de la viandaj pladoj ligiĝas ne kun la ingrediencoj aŭ maniero prepari, sed kun la partoj de bestokorpo je kiuj laŭ la kazaĥa tradicio estas dividata ĉevalkorpo. Tiaj estas: *kabyrga*, *tostik*, *ĵanbaz*, *ĵal*, *ĵaj*, *suret-et*, *beljdeme* k.a.

La ĉefa kombinaĵo en la pladoj estas viando kaj farunaĵoj. La ŝatataj trinkaĵoj estas preparataj el ĉevalina, kaprina kaj bovina lakto. La teon en Kazaĥstano oni trinkas nepre kun lakto, kremo kaj eĉ kun acidkremo.

La festa tablo dastarĥan

Gastamo ĉiam estis distinga trajto de kazaĥoj, gastojn en la hejmo oni ĉiam dece akceptas kaj disponigas al ili honoran lokon. Unue al la gasto oni proponas kumison – ĉevalinan lakton, acidlaktajn produktojn: *ŝubat* el kamelina lakto aŭ *ajran* el bovina lakto.

Poste kun teo (nepras aldone lakto aŭ kremo) oni proponas *bauirsaki*, pastobuletojn frititajn en fandita graso (aŭ en graso kun oleo), rosinojn, sekigitajn buletojn el fromaĝo (*irimŝik*) kaj kazeo (*kurt*).

Poste sur “dastarĥan” aperas platkukoj kaj antaŭmanĝetaĵoj el ĉevalaĵo aŭ ŝafaĵo. La plej populara manĝaĵo ĉe la kazaĥoj estas *beŝbarmako*, konsiderata kiel la ĉefa plado de la nacia kuirarto. Ĝi konsistas el kuirita viando, maldikaj pastaĵpecoj kvadratformaj kaj forta buljono.

Beŝbarmako en la kazaĥa signifas “kvin fingroj”, ĉar oni manĝas ĝin per manoj. Granda telerego (*tabak*) kun beŝbarmako estas metata en la centro de la tablo. La divido de la viando ĉe “dastarĥan” estas vera rito. Ekzistas tuta sistemo, kiujn pecojn ricevu tiu aŭ alia persono ĉe la tablo el la manoj de la mastro: unue la maljunuloj, poste la infanoj, sekvas proksimaj kaj malproksimaj parencoj ktp. Beŝbarmakon oni manĝas kun la forta buljono *sorpa* servata en specialaj bovloj sen teniloj.

Tradiciaj pladoj de la kazaĥa kuirarto

Beŝbarmako estas la ĉefa plado, laŭeble el tri viandospecoj (ĉevalaĵo, ŝafaĵo, bovaĵo), pastaĵo kaj cepoj, preparata en kaldrono. *Kazy* estas ĉevalkolbaso: ĉevalviando kun spicaĵoj en intestoj sunsekigita aŭ fumaĵita. *Ŝuĵuk* estas fumaĵita kolbaso. *Sorpa* (*ŝurpa*) estas densa vianda buljono kun viandopecoj (ŝafaĵo). *Kuerdak* estas stufita ŝafaĵo kun cepoj kaj spicaĵoj.

Tre variaj estas laktaĵoj. La plej populara estas kumiso, konata ankaŭ en Eŭropo, oni preparas ĝin el ĉevalina lakto per fermentado. *Katyk* estas preparata per boligado de acidiĝinta lakto. *Suzjma* estas densa acidlakta produktaĵo, kiun oni iomete salas. *Kurt* estas kazeaj globetoj, kiujn oni formas el *suzjma*, aldonante salon kaj pipron. Poste oni sunsekigas ilin. *Ajran* estas freŝiga acidlakta trinkaĵo.

En Kazaĥstano loĝas multaj popoloj: rusoj, tataroj, ukrainoj, uzbekoj, ujuguroj, dunganoj, germanoj, koreoj... ili influis ne nur je la kulturo kaj vivmaniero de kazaĥoj, sed ankaŭ je la manĝkutimoj. Tial pilafo, dunganaj nudeloj, lagmano, mantoj kaj multaj aliaj pladoj hejmiĝis kaj iĝis integra parto de la kazaĥa kuirtradicio.

Receptoj por via tagmanĝo

Beŝbarmako

Variaĵo I. 1,5 kg da ĉevalaĵo, 250 gr da ĉevalkolbaso *kazy*, 250 gr da fumaĵita ĉevalkolbaso *ŝuĵuk*, 250 gr da ŝafa brustaĵo, 2,5 l da akvo.

Variaĵo II. 1,5 kg da ŝafaĵo, 500 gr da *kazy*, 250 gr da *ŝuĵuk*, 2,5 l da akvo.

Por ambaŭ variaĵoj:

Pasto: 500 gr da faruno, 2 ovoj, ĉ. 0,5 glaso da akvo, 1 tekulereto da salo.

Legoma parto: 3-4 cepoj, 1 glaso da urso ajlo, 3 kuleroj da petroselo, 1 kulero da nigra pipro.

Preparado:

1. Freŝa (nepre freŝa) viando, prenita per granda peco ne malpli ol 1,5 kg, estu kuirata tutece en la sama kvanto da akvo (viando estas surverŝata per bolanta akvo) sur malforta fajro en kaserolo kun premita kovrilo dum 2,5 h.

2. Dum ĉi tiu tempo la grason de la buljon-surfaco forprenadu en apartan ujon.

3. Kuiru la ĉevalkolbasojn en bolanta akvo en aparta kaserolo.

4. Kiam la viando pretos, eligu ĝin, tranĉu ĝin je maldikaj sed larĝaj pecoj kontraŭ viandofibro (ĉ. 4x4 cm), surverŝu per kvarono da buljono, aldonu cepojn tranĉitajn je pecetoj, pipron, spican verdaĵon; kuiru sur tre malforta fajro dum 5-7 minutoj.

5. Samtempe kun la kuirado de la viando preparu nudelojn: faru densan paston, platigu ĝin ĝis 2 mm kaj tranĉu je kvadratoj ĉ. 6×6 cm. Kuiru ilin en la buljono, restinta post la kuirado de la viando, aldoninte al ĝi duonon da cepo kaj unu petroselon.

6. Poste eligu la nudelojn en profundajn tasojn, surverŝu la varmigitan grasajon prenitane de la buljono, surverŝu per pipro, verdaĵo kaj supre metu montete viandon, trancitan je pecoj kaj ankaŭ ostojn kun viando. Surverŝu la tuton per la buljono aŭ faru specialan saŭcon *zuzduk*. Distranĉu kaj surmetu la ĉevalkolbasojn.

7. La restaĵon de la buljono, en kiu estis finpretigata la tranĉita viando, kunigi kun la buljono, en kiu estis kuirataj la nudeloj, varmigu kaj surtabligu en apartaj bovletoj, surŝutinte petroselon kaj tranĉitan ursan ajlon.

8. La viandon kaj nudelojn oni manĝas trinkante buljonon kaj manĝante platkukon *tabanan*.

Saŭco zuzduk

100 gr da kurto, 1 glaso da varma akvo aŭ vianda buljono, 25 gr da butero, 1-2 cepoj, 1 ajlokapo aŭ fasko da urso ajlo, 1 kulero da faruno, duonkulereto da nigra muelita pipro.

Kurton dispremu, miksu kun faruno, diluu per akvo aŭ buljono. La spicaĵojn ete tranĉu aŭ pistu, iomete fritu, miksi kun la diluita kurto.

Bauirsaki

500 gr da faruno, duonglaso da fandita ŝafa graso, 2 glasoj da *katyk* aŭ *ajran*, 15-20 gr da fermento, 1 tekulereto da salo.

Preparu paston, post 20-30 minutoj longigu la paston kvazaŭ ŝnuron je dikeco de fingro. Tranĉu la paston je larĝo 1-1,5 cm. Fritu en varmigita sed ne bolanta graso en kaserolo kun dika fundo.

Bauirsaki estas servataj por ĉiuj viandaj manĝoj, foje oni manĝas ilin memstare.

Halina Gorecka



Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Sinsekvaj armeoj flikendaj

Sed neeviteble en la rakonto aperas tempaj trupoj, kiujn la aŭtoro klopodas fliki per koncizaj klarigoj... (Stanislao Belov: *Verko profesia, altnivela, unuflanka // La Ondo de Esperanto*, 2019, N^o2, p. 60)

Laboro, re kaj re

La virino realigis kaj realigas la reproduktan laboron kiu permesas la survivadon de kaj individuoj kaj socioj. (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Virino>)

Hoj', hoj', vekigas pasi'!

Fondita en 1887 de la polo Lazaro Luiz Zamenhoj, celanta unuigi la popolojn, la lingvo vekas pasiojn inter siaj subtenantoj... (Espiritismo Brasil Chico Xavier, 10 aŭg 2014, <https://www.facebook.com/espiritismobrasilcom/posts/722021967847115>)

Takasi taksias trian eraron

En la artikolo *Kiu mastrumas ĉi tiun landon* de Isakawa Taksi (Monato, 2019/02, p. 6) enŝteliĝis du eraroj. (*Pardonpeto* [de la redakcio] // *Monato*, 2019, N^o4, p. 5)

Obstina kredo

... la kvanto da tiuj, kiuj kredas [misinformon], estas mule pli alta, ol tiu inter la membroj de UEA... (Dima Ŝevĉenko, Anna Striganova: *Pri la informa sekureco de UEA // Esperanto*, N^o4, p. 77)

Por elguŝigi la veron

Mi elektus homojn, kiuj havas daŭilongajn spertadojn bone gvidi organizaĵojn. Mi volas legumi la resumojn. (Sola Malsamideano, 16 apr 2019, <https://www.liberafolio.org/2019/04/15/emilio-cid-volas-ke-uea-prioritatigu-informadon/#comment-2746>)

Sturmu per sopiro

... la laborista movado atingis unu el la plej deziratak celoj, nome la 8-horan labor-tagon. (*Komunikoj // La Kancerkliniko*, 2019, N^o169, p. 20)

Sesioj pri klasika temo

Olga Ŝiliaeva ... en pluraj eventoj ... gvidis intru- kaj trejnseiojn... (<https://uea.org/aktuale/komunikoj/2019/Olga-Sxiliaeva-regxisoros-la-kongresan-temon-de-Lahtio>; rimarkis Ibrahim Bryzgaloff)

Fariĝu sukulenta planto

Reta aloiĝo: uea.org/kongreso/alighilo (*Komunikoj // La Kancerkliniko*, 2019, N^o169, p. 20; trovis Ionel Onet)

Plukis István Ertl

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 850 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadeŝda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa maja Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>